

Jarraporto de BEJA/FLEJA

Membroj : 140 en '79, certe kresko en '80
Rimarko por la kluboj : bonvolu ĉe membriĝo de JM (junula membro), kursano aŭ simpatianto malpli ol 25 j. ĉiam menci la naskifdaton, tiel ke ili povus ricevi la junularajn revuojn.

Estraro : Prezidanto (eksterne) kaj sekretario : Kristin Tytgat
Administranto kaj prezidanto (interne) : Gerd Jacques
Kasisto : Luc Potiau
Eksteraj rilatoj : Herman Deceuninck
Kongresoj : Katja Lödör (kaj kunlaborantoj)
Redaktoroj : Jen : Herman Deceuninck
Koncize : Wim Tytgat
Pasporta Servo : Ite Tytĉat
Rilatoj kun : BEF : Kristin Tytgat
FEL : Luc Potiau
(APE : Marc Thollet)
TEJO : Gerd Jacques kaj Kristin Tytgat
ILEI : Katja Lödör

AGADO :

1. Kiel BEF dividiĝis en FEL kaj APE, ankaŭ BEJA disiĝis: la 23.09.79 ni starigis FLEJAN (Flandra Esperantista Junulara Asocio) kun novaj statutoj, preparitaj de 3-persona komisiono. Pro la manko de organizita valona junularsekcio ekzistas kelkaj problemoj por ke FLEJA povu aliĝi al TEJO, sed ni jam estas sur bona vojo al solvo, ĉar jam ekzistas kontaktoj pri tio kun Marc Thollet kaj F-ino Drèze, la prezidanto de APE.
2. Komence de nov.'79 okazis FLEJA-NEJ-renkontiĝo en Lichtaart kun 135 partoprenintoj. La temo "Etnaj minoritatoj" estis bonege ellaborita, la manĝoj bone prizorgitaj kaj ne mankis distraj programeroj. Ekzistis speciala programo por junuloj malpli ol 16 j. En nov.'80 ni intencas organizi samspecan semajnfino en Geel (verŝajne) kaj ni kore invitas jam nun ĉiujn Esperanto-junulojn el Belgio kaj el eksterlando.
3. Ni jam faras kune kun TEJO kaj Esperanto-2000 (Lovenjo) antaŭekzamenojn kaj preparojn (kotizo-salonoj-manĝoj-studentohajmoj-programo-varbado) pri eventuala Internacia Junulara Kongreso en '82 antaŭ aŭ post la UK en Antverpeno.
4. Gerd Jacques partoprenis kun 5-6 junuloj malpli ol 16 jaroj internacian infankunveno en Sarajevo (Jugoslavio) fine de junio '79 kadre de la jaro de la infano.
5. Ni verkis novajn varbilojn "Esperanto voor jou" laŭ la ekzemplo de la hispanlingva TEJO-varbilo. Daŭre FLEJA vendas naskifdatokalendarojn kaj Esperanto-sakojn.
6. Nia Pasporta Servo (senpaga loĝservo por Esperanto-junuloj en la tuta mondo) bone funkcias. La libroj por '80 estas aĉeteblaj ĉe Ite Tytĉat. De institucio Eodler ni povus ricevi monon por eldoni varbfoliojn aŭ afiŝojn pri Pasporta Servo. Ite Tytĉat ankaŭ intencas starigi korespondan servon.
7. La revuo Jen entenas nun parton por junuloj de malpli ol 16 j., prizorgiten de Cliva Van Eeghem.
8. En la kadro de Regiona Agado de TEJO FLEJA pretas helpi malfortan Landan Sekcion aŭ grupon ie en la mondo. Ni ankoraŭ atendas proponojn de TEJO tiurilate.
9. Dum la pasinta Internacia Seminario en Würzburg (FRG) la junularo starigis BEJIn (Biciklista Esperanto Movado Internacia) kun propra revuo. Pro intereso niaflanke FLEJA klopodos kunlabori kaj varbi por BEJI.

Sekretario : Kristin Tytgat
St-Hathebrandstr. 8
2510 Mortsel

Mortsel, marto 1980